

La Suda Kruco

Organo de la Australiaj Esperantistoj

Redakcio-Administracio :

Box 1367, Elizabeth-st. P.O.

Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio : 3 ŝilingoj.

Ekster Aŭstralio : 3 ŝh. 9 p.
au 18 respondkuponoj.

Anoncoj : Por 3 linioj : 1 ŝilingo au 4 respondkuponoj.

N-ro 3

Melburno (*Melbourne*), Aŭstralio

Septembro, 1920

NOTES FROM NEW ZEALAND.

For many years Esperanto in New Zealand has had a strong supporter in Sir Robert Stout, the Chief Justice. Some time ago he contributed in an article in "The Christchurch Press," a lucid account of Esperanto and its structure, which has been of no little propaganda value. In this and other ways he has consistently forwarded the movement in the Dominion.

In Wellington, the activities of Mr. Edmanson, formerly of Melbourne, have done much to keep the verda stelo in the ascendant during the war. The difficulties of Australian Esperantists—isolation, the indifference of the public, which sees little use in "foreign languages," and the general distrust of anything international as being probably connected with dynamite or spies—were felt even more acutely in New Zealand. Nevertheless, Esperanto progresses in New Zealand as elsewhere.

Of late years we have heard much of the study of Esperanto by malliberuloj: interneoj, prisoners of war, conscientious objectors, and the like. Now the civil prisoners of New Zealand are following in their excellent footsteps. The Prisons Board, of which Sir Robert Stout is the chairman, has permitted the study of Es-

peranto by inmates of New Zealand prisons, and an active group exists in the Auckland gaol. In addition, correspondence in Esperanto is, subject to certain restrictions, permitted with the outside world, and the Controller-General of Prisons is allowing considerable latitude in the matter, believing that a humanitarian study, such as that of Esperanto, has already had a beneficial effect on several of the prisoners. One of the students is preparing himself for the examination for the B.E.A. diploma, and, judging by his progress, it seems not unlikely that he will succeed. The following passages are from an interesting letter from one of these prisoner-students:—

"Mi ghojas sciigi vin, ke ses viroj nun cheestas la kurson; unu eksighis pro enuo, kaj pro tio mi intervjuis la chefon, petante, ke li permesu du plu cheesti la kurson, kaj li tion faris. Pri via sugestio, ke mi prenu malantaŭan sidejon kaj anstataŭigu unu el miaj kunuloj en la estreco de la kurso, mi tion intencas fari, sed nuntempe estas ankoraŭ tro baldaŭ, sed tuj kiam — kapablos, mi metos lin en la estrecon de la kurso. Sed se okaze mi forirus antaŭ ol li kapablos, mi povus nomi ankoraŭ samideanon, kiu tre kapablas instrui nian karan. . . . Dankon pro la ekzemplero de 'La

Suda Kruco"; en ghi mi rimarkis kelkajn erarojn; entute ghi ne estis malbona, konsiderante, ke estas la unua numero. . . ."

NOVAJ GRUPOJ.

Pluan kaj gravan progreson la movado faris lastatempe en Sidnejo. Fondighis tri novaj grupoj, nome, en la kvartaloj Waverley kaj North Sydney, kaj grupo de knaboskoltoj en Kogarah.

Gratulon al la novaj kunlaborantoj. Ili longe vivu kaj floru.

HELPU LA INFANOJN.

Responde al la alvoko en nia lasta numero por la malsataj, senvestaj infanoj de Austrio, por kiuj ni petis mondonacojn, la sekretario de A. E. A. jam ricevis pli ol 15 funtojn. Al tio materie helpis vendado de donacoj che sinjorino Pyke, en Brighton, apud Melburno, en sabato la 28-a de septembro.

Aankorau estas tempo por helpi la senkulpajn suferantojn. Mondonacojn oni bonvolu sendi al la sekretario de Australia Esperanto-Asocio, Box 731, Elizabeth-street P.O., Melbourne.

LA AUSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO.

Chiuvara Koncerto.

La dek-dua chiuvara koncerto de la A. E. A. havos lokon en la nova "Austral Salon" (Hardware Chambers, che angulo de Elizabeth-strato, kaj Post Office-place) en merkredo, 8a de septembro.

Oni promesas bonegan programon. La organizadon de la koncerto oni komisiis al la agemaj sinjoroj Pyke kaj Rawson, kies sperto certigas plenan sukceson.

La ĉefa numero de la programo estas kiel kutime komedio. Ghi estos en unu akto, kaj . . . sed tio estas sekreto ghis la 8a de septembro!

LA GAZETOJ KAJ ESPERANTO.

La gazetaro ne tute ignoras nin. En lasta tempo aperis informo aŭ raporto pri Esperanto en ĉiu el la sekvantaj gazetoj: "The Australasian Manufacturer" (trifoje; la redakcio tre favore rigardas nian aferon de komerca vidpunkto, dank' al propa-

gando de sinjoro Pfahl, el Sidnejo); "The West Australian"; "Education" (organo de la instruistoj de Nova Sud-Kimrio); "The Cumberland Times" en Parramatta; "Alert" (Sidnejo); "Table Talk"; "Labour Call"; "Band of Hope News"; "Caulfield News" (Melburno); kaj en ĉiu el tri ĉiutagaj gazetoj de Melburno: "Age," "Argus" kaj "Herald."

Krom tio aperis la regula propaganda kolono en la vaste legata "Stead's Review" kaj en la Brisbane "Daily Standard."

Tiu ĉi listo ne estas plena; la redaktoro ĉiam plezure ricevos gazetetojn aŭ datitajn gazeteltirojn, kiuj Esperanto estas priparolanta. Bonvolu sendi ilin!

ESPERANTISTA BALO.

"Dancu, dancu ni, kolegoj,
dum ni junaj estas."

Evidente la Esperantistoj restas ĉiam ĉi, se oni povas ĵughi per gajeco de ilia dancado. Tre brila komovoplena spektaklo estis la Esperantista balo, kiu okazis en Melburno la 5a de aŭgusto en la salono de Ĉiu Sanktuloj, en Windsor. La salono estis plena, sed ne tro plena. La orkestro de Di Gilio lule muzikis en bosko de palmoj. La planko estis perfekta. La dekoracio ravis ĉiujn. La kostumoj. . . .

Ha, la kostumoj! Tian brilan, belan, bravan serion de kostumoj oni malofte vidas. Hispano estis tie, ĉi nigro kaj rugho, Indianino kun "batala koloraĵo" kaj plumoj, Egiptoj shajne ĵhus elirinta el la paghoj de "La Faraono," tute blanke vestita monaĥo, Australia kamparano en blua pantalone kaj malstreĉa ĉemizo, kun tufo de eukalipto sur ĉapelo, Fighianino en ĵupo el pajlo kaj vaste frizita hararo, Angla koretegnano el la dek-oka centjaro, Elzcanino en la Franca rugho, blanko kaj bluo, kiu dancis kun Germano (Esperanto repacigas la naciojn!), kaj China samideano, kiu tre brile klapante maskis sin kiel. . . . Chino.

De propaganda vidpunkto la balo havis valoron. Ghi estis afishata kaj kelkaj gravaj magazenoj dum du semajnoj, kaj neesperantistaj partoprenantoj interesighis pri nia afero.

Tri gazetoj bone raportis: "Punch," "Table Talk" kaj la chiutaga "Herald."

La organizadon de la balo oni shuldas al la sindona laboro de sinjoroj Pyke kaj Rawson, kies longa klopodo gajnis alte merititan sukceson.

LA LINGVO ESTAS CHIE, KIE GHI UZIGHAS.

Kio estas lingvo? Chu ghi kushas en la gramatikoj kaj vortaroj? Ne, tute ne, tie kushas nur skeletaj rimarkoj pri ghi. Ne en la libroj trovighas la lingvo, sed chie, kie ghi skribighas kaj parolighas.

Tie chi estas la lingvo, dum ni parolas, hodiau matene dum ni diskutadis, hierau vespere en la deklamado, chiu-tage en niaj konversacioj, en niaj leteroj, en niaj gazetoj; chie, kie sonas Esperanto, chie, kie flugas esperantaj frazoj, chu de lipoj al oreloj, chu de plumo al okuloj, tie estas nia lingvo, kaj tie ghi vivas. La lingvo estas chie, kie ghi estas uzata.—El parolado de Edmond Privat che la Sepa Kongreso.

LA KANTOJ DE SIDNEJO.

La muziko de chi tiuj kantoj, kies teksto aperis en la lasta numero, estas havebla che "La Suda Kruco." Sendu 5 poshtmarkojn (7½ pencej) al Box 1367, Elizabeth-street P.O., Melbourne. Oni bonvolu noti la jenajn korektojn.

"Amatino Mia": En la Rekanto forstreku la lastan linion; la rekanto havas nur kvar liniojn.

"Piknika Invito":

En la dua linio legu ghui anstataŭ glui (!).

La dua stanco devus esti jene:

Ho, inter la floroj, en fresha aero,
ni dancos kaj kantos per dolcha
kantar';
ni ridos, parolos la lingvon de i'
koro...

Ni amos en verda kaj bela arbar'
kun vi! Kun vi!
Ni amos en verda kaj bela arbar'.

Entute ni devas peti la pardonon de niaj legantoj pri la malfrueco de la lasta numero kaj la eraroj, kiuj enrampis malgrau zorga korektado. Ni

faras nian eblon por ne plu tiel ofendi.

La poezio "La 'Santa Maria'" ankau suferis. La kvar lastaj linioj de la unua stanco devus esti:

neniam ond' shin movos, char
profunden shi subighis tro.

Chiu pace dormu do,
kie mort' kushigis lin.

En la bilanco de la Tria Kongreso la elspezo por presado devus esti 5f. 4sh. 7p.

Bonvolu ne pafi la presiston; li faras sian eblon.

LA DEVENO DE LA VERDA STELO.

De doktoro Zamenhof, al kiu oni skribis por akiri informon pri la deveno de nia chie uzata simbolo, la jena interesa letero estis ricevita:

"Kara Sinjoro,—Pri la deveno de nia verda stelo mi nun jam ne memoras bone. Shajnas al mi, ke pri la verda koloro iam atentigis min S-ro Geoghegan, kaj de tiu tempo mi komencis eldonadi miajn verkojn kun verda kovrilo (la atentigo estis tute senintenco). Pri unu broshuro, kiun mi tute hazarde eldonis kun verda kovrilo, li rimarkigis al mi, ke tio estas la koloro de lia hejmo, Irlando; tiam venis al mi en la kapon, ke ni povas ja rigardi tiun koloron kiel simbolon de Espero.

"Pri la kvinpinta stelo, shajnis al mi, ke unue ghin presigis sur sia gramatiko S-ro de Beaufront. Tio plachis al mi, kaj mi prenis tion kiel signon. Poste per asociado de la ideoj aperis stelo kun verda koloro.

"Via

"L. L. ZAMENHOF.

"30. XII. 1911."

CHU VIA GRUPO HAVAS VERDAN STANDARDON?

Chiu grupo devus havi verdan standardon. Ghi estas utila, kvietla rek-lamilo. Oni povas uzi ghin dum festo, publika kunveno, au ekskurso, au simple pendigi ghin ekster la grupa kunvenejo. Per tio la homoj scios, ke Esperanto ja vivas. La sekvanta estas la desegno de la standardo oficiale akceptita che la Unua Internacia Kongreso en Boulogne-sur-Mer (Francio) en 1905. Sed por eviti miskomprenon au konfuzon kun aliaj

movadoj, estas bone aldoni sur la standardo la vorton "Esperanto" en sufiche grandaj literoj!

"Verda fiago, kies longeco estas unu metro kaj duono, largheco—unu metro; blanka kvadrato duonmetra, sidanta en la pli alta angulo plej proksime de la stango, portas la konatan verdan stelon, en kies centro estas blanka litero E."

Unu metro egalas 39.37 Anglajn colojn (inches).

"THE ESPERANTO GUIDE."

Translation of the Exercises.

Exercise 9.—Mi donis panon kaj akvon al la birdoj, ĉar ili volis manghi kaj trinki. Teodoro lernas diligente, ĉar li amas la patron. Bonaj infanoj ne forpelas la birdojn. Li diras, ke la kanto de la birdoj estas agrabla al li. Al kiu vi donas la manon nun? Al mia avo. De Johano mi ricevis kraĵonon, kaj de Ludoviko mi ricevis plumon. Kiu venas al ni? La frato de Teodoro. Mi skribis la leteron per kraĵono, ĉar mi ne havis plumon. La infano, kiun Aleksandro batas, estas la frato de Johano.

Exercise 27.—Ni uzas la artikolon en Esperanto, kiam ni volas esprimi la tutecon de estaĵoj aŭ objektoj. La artikolo estas ankaŭ uzata, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. La kuraghulo ne timas dangheron. Mi aĉetis panon, vinon kaj lakton. La palaco de reĝo ne estas ĉiam la loghejo de felichulo. Simpla kunmeto de vortoj donas en Esperanto multegajn novajn vortojn, kaj estas la fonto de granda riĉeco en la lingvo. Kutime oni prenas nur la radikojn por formi ĉi tiujn kunmetitajn vortojn, sed se estas necese pro bonsoneco aŭ klareco, oni prenas ankaŭ la gramatikan finon. La ĉefa vorto staras en la fino, kaj la vorto kiu difinas tiun vorton, staras antaŭ ĝi. Himnolibro estas antaŭ ĉio libro, kaj la vorto "himno" diras al ni, kia libro ĝi estas; tial himnolibro estas libro de himnoj. Manlaboro; noktomezo; tagmezo; unuenaskita; piedbenketo; mondlingvo.

(Next month: Exercises 10 and 28.)

ADIAU! MIA KARA PATRUJO

(Adieu! Adieu! My native land.)

De Byron.

Adiau! Adiau! Mia kara patrujo forighas de l' blua akvaro; ekghemas la ventoj, la ondoj mug

hadas,

kaj super ni krias la mevo.

Ni sekvas la sunon, kaj ĝi sub la maron

subiras en sia irado;

adiau al ĝi, kaj adiau al vi,

adiau, mia kara patrujo!

Per vi, mia barko, mi iros rapide, portate trans shauman la maron; al kiu ajn lando, por mi ne signifas, se ne al denove la mia.

Bonvenon, vi bluaj, mallumaj ondetoj,

kaj kiam vi iros el vido, dezertoj! kavernoj! bonvenon al vi adiau, patrujo la kara!

—El la Angla tradukis

J. Arnold Hodges.

Hastings, Novzelando.

MEDITOJ.

El la Verkaro de Margaret Coppin.
"La stilo estas la homo" estas neniam tiel vera, kiel kiam virino verkas.

Ju pli oni sin konas, des malpli oni sin admiras, kaj des pli oni konas aliajn.

La vivo estas mozaiko: la malbonaranghitaj detaloj malbonigas la tuton.

Virino estas ĉiam pli felicha aŭ plimalfelicha ol viro: ŝi ghuas aŭ suferas pro malgrandaj aferoj.

Oni regas la virojn per bonaj manĝaĵoj, la virinojn—per dolĉaj vortoj, la homojn—per grandiozaj frazoj.

Nenio faras personon tiel humila kiel la amo de senkulpa infano.

Herezo kaj ortodokseco estas la materialo de la tempo: la herezo de hodiaŭ estas la ortodokseco de morgaŭ.

La plej bonaj el niaj amikoj interesis pri niaj aferoj, sole kiam ili mem estas tushataj per ili.

En amikeco, kiel en amo, oni ĉiam donas pli, ol oni ricevas: tio estas kial estas bone ami.

Ami estas ĉiam pardoni: antaŭ

dume kaj poste . . . kaj estas ankoraŭ
volonte pardoni.

Rutino estas la plej bona defendo
de malsaghaluloj. Oni devas havi gran-
dan inteligenton por foriri de la ordi-
nara vojo, kaj ne sin impliki en mal-
facilojn.

Oni delogas viron per la okuloj,
virinon—per la oreloj.

Post chio, ne tiom valoras tio, kion
oni diras, kiom la maniero, en kiu
oni diras ghin.

—Tradukis sinjorino A. M. Hogg.

LA EDZINO DE LA PATRO.

Amrakonto, de Iu, Kiu Neniam Amis.
Originale verkis Ezoko.

Ludoviko Deprat marshis sur la
strato. Oni povis vidi, ke iö treege
chagrenas lin. La patro forlasis la
domon antau kelke da semajnoj por
libertempi inter la montoj, kaj hodiaŭ
la filo ricevis leteron, kiu kauzis la
chagrenon. Jen la letero:

“Mia kara Ludoviko:

“Jam mi faris pashon, kiu, mi kre-
das, donos al vi surprizon. Antau
kelke da tagoj mi edzighis kun charma
sinjorino. Mi estas tre felicha, kaj mi
esperas, ke mia ago felichigos vin.
Via patrino kaj vi kaj mi chiam loghis
kune felice, kaj shia morto doloris
nin, sed ni ne devas funebri por chiam,
tial mi pensas, ke estas pli bone trans-
loki nin el nia malnova domo. Mi
intencas aĉeti domon en alia parto
de la urbo. Dume mi havas chamb-
raron en la hotelo ‘Verda Stelo.’ Mi
petas, ke vi vizitu nin merkredon post-
tagmeze.

“Via duonpatrino estas iom pli juna
ol mi, kaj tre charmoplena. Kiam vi
konos shin, vi tutkore aprobos mian
agon.

“Patre la via

“S. R. DEPRAT.”

Ke la letero estis frapo al la junulo,
estas esprimio tro milda. La surprizo
estis tiel granda, ke li ne povis orde
pensi. Li marshis al la “Verda
Stelo” preskau en songho.

Li vekighis el la songho per subita
chirkaubrakado, kaj li audis voĉon:—
Ho, sinjoro, helpu! Tiu chi viro in-
sultis min!

Li turnis la kapon, kaj li vidis dol-
chan vizaghon kontraŭ sia shultro.

Samtempe, drinkulo kun malfirmaj
pashoj preterpasis lin. Li tuj sin
movis por kapti la drinkulon, sed la
mano sur lia maniko haltigis lin.

—Ne sekvu lin, sinjoro; eble li ne
intencis tushi min. Mi ne vidis lin . . .
pripensis ion . . . ne rimarkis lin . . .
subite mi estis kontraŭ li kaj mi ekti-
mis.—La bluaĵ okuloj esprimis plej
dolchan bedaŭron.

—Sed chu vi estas certa, ke li ne
vundis vin?—demandis Ludoviko. Li
tre deziris esti kavaliro por la esprim-
plenaj bluaĵ okuloj.

—Mi certigas vin, ke ia afero pleni-
gis mian cerbon . . . io ghenis min . . .
kaj mi ne rimarkis, kie mi marshas.
Mi tre bedaŭras!

—Nu, estas tre bedaŭrinde, ke frau-
lino ne povas marshi sur la stratoj de
nia urbo, sen ke drinkulo teruras shin.

—Estas mia kulpo . . . eble la drink-
ulo ne insultis min . . . mi ne rimarkis.

—Jes . . . sed . . . tio estas . . . —
Ludoviko forgesis pri la letero de la
patro, kaj nur pensis, ke li devas helpi
c.i. tiun charman kreiton.

—Ne ghenu vin, sinjoro. Li ne
tushis min, kaj nun li forrapidas . . .
Jen fiakro! Se oni jam ne okupis
ghin, mi eniros.

Ludoviko venigis la fiakriston, kiu
post interkonsiligho kun la fraulino,
malfermis la pordon de la automobilo.
La fraulino dankis kore Ludovikon,
kaj baldau Ludoviko staris sola sur
la trotuaro. Li, kun chapelo en la
mano, rigardis sopire la forrapidantan
fiakron. Pro ghentileco li ne aus-
kultis la interparoladon de la char-
mulino kun la automobilisto, tial li ne
sciis, kien shi iras. Bedaŭrinde ne
estis alia automobilo, kiun li povus lui,
tial li sentis la kruelecon de la sorto,
kiu donis al li vizion de beleco, nur
por tuj forkapti ghin.

Kiom da tempo li restis senmove, li
ne sciis. Li tute forgesis pri la patro
kaj la hotelo “Verda Stelo.” Kiu shi
estis, la fraulino kun la kaptantaj
okuloj kaj la kisinda busho?

Li rekonsciighis, kiam la drinkulo,
sin turninte, ekpushis lin, dum li pre-
terpasis kun malfirmaj pashoj. Ludo-
viko remetis la chapelon kaj daurigis
la marshon. Tre profundaj estis liaj
pensoj. Li ne sciis, kiel li marshas,
sed li trovis sin antau la hotelo
“Verda Stelo.” Li penis memori, ke

lia patro estas en tiu hotelo kun nova edzino, sed ree lia animo profundighis en la penson pri la plej charma el chiuĵ charmulinoj en la mondo. Li penis memori, ke la patro doloris lin, kaj ke li koleras la patron, sed vane; ree la bildo de la belulino kun la bluaj okuloj kaj la oraj haroj estis antaŭ li.

Petinte pri la chambraro de la patro, oni sendis lin per la lifto al etagho, kie servisto kondukis lin al la chambraro. La servisto kondukis lin en antauchambron, dirante, ke la sinjoro luan to jam parolis pri vizitonto, kaj deziris, ke la vizitonto atendu lian revenon. Chu la vizitanto afable faros tion? Ludoviko sidighis, kaj la servisto foriris.

Post iom da tempo li forlasis la seghon kaj marshis en la chambro. La chambro estis malgranda, kaj li rimarkis, ke pezaj veluraj kurtenoj eble apartigas pli grandan chambron. Li rigardis inter ili kaj trovis salonon bele meblitan. Li silente pashis tra la enirejo, kaj staris chirkauite per la faldoj de la kurteno.

Pasis kelke da momentoj, antaŭ ol li vidis, ke sinjorino estas en la chambro. Turninte la kapon, li vidis, ke ŝi rigardas lin surprizite. Fulmotondro frapis lin. Ŝi estas la charmulino, kiu plenigis lian tutan animon, kaj . . . kaj . . . estante tie . . . ŝi devas esti la edzino de la patro!

Ŝi venis al li, kun plezuro kaj surprizo en la okuloj.

—Sinjoro . . . —ŝi komencis.

—Deprat!—Ludoviko kriis rauke, haltigante ŝin.

Ŝi rigardis lin kun teruro. Uragano tropika estis en la cerbo de la junulo. Li sentis, ke la ventego trakuras lian korpon, kvankam li staris rigide kun okuloj fiksitaj sur la vizagho, kiu palighis morte post lia rauka krio "Deprat!"

Kiom da tempo pasis, antaŭ ol ili interparolis, ili neniam povas memori. Ili rigardis unu la alian, timante rompi la silenton.

—Mi foriras—li diris fine.—Mi havas amikojn, mi devas viziti ilin.

—Ne estu malsagha!—ŝi diris.—Mi foriras. Ne grave. Mi havas onklinon.

—Ne, vi ne devas foriri. Vi devas

resti. Mi foriros; mi skribos!—li diris konfuzite.

Ŝi rigardis lin kun okuloj plene de larmoj. Subite ŝi kashis la okulojn per la manoj, kaj ploretis:—Kio mia patrino povis fari ghin?!—

Tiam en la cerbon venis alia junulo: "La patrino de la belulino edzinigis ŝin kun mia patro. Eble ili estis malrichaj, kaj la patrino kriis dis sin bonkora, devigante la filino edzinighi kun richa maljunulo."

—Ne ploru,—li diris;—mia patro estas bona viro. Vi estos felicha kun li; kredu al mi, li estas bona!

—Via patro?—Ŝi rigardis lin tra la larmetoj.—Via patro? Chu vi kredas, ke via patro ne parolis pri la edzigho? Chu vi devas veni al la patro por paroli? Chu vi ne havas monon por via propra nomo?

Li ridetis.—Mi antaŭe neniam bezonis ghin. Ni loghadis kune, kaj la patro chiam donis al mi sufichon. La patro estas tre bonkora.

—Jes, sed nun chio estas shanghit Kompatinga junulo!

—Mi ne komprenas—li diris, kiam aldonis kun vintra rideto:—Chu vi elspezos la tutan renton de mia patro?

—Tute ne! Mi iros al mia onklinoj kaj mi laboros. La mono de via patro, shajnas al mi, aĉetis tiun veston, sed mi neniam portos ghin ree. Ho, la honto!—Ŝi kashis la vizaghon.

—Vi ne povas forlasi la edzon tiel facile. Tio estas tro kruela. Nun estante sinjorino Deprat, vi devas fari vian devon al mia patro.

Subite la charmulino regis sin kaj rigardis scivoleme la junulon. Post ŝi ridetis kaj fine kashis la vizaghon kaj ridegis. La junulo timis, ke ŝi havas histerion.

—Ho, sinjorino, estu sinregala! Ili petas! Eble la patro venos, kaj vi ne devos esti tiela. Sinjorino! Sinjorino!

—Mi ne estas sinjorino!

—Kion?—Sed la sinjorino nur kashis la vizaghon kaj ridis.

—Ho, kia eraro estas la mia!—ŝi kriis, subite malkashante la vizaghon.—Mi pensis, ke vi estas mia dua patro!

—MI!!—kriegis Ludoviko. Do vi estas la edzino de mia patro!

—Ne!

Why I should become a Member of an Esperantist Society

Because—

by doing so I shall assist in the following **Esperantist objectives**:—

- | | |
|--|--|
| <p>(1) To make Esperanto the officially adopted Auxiliary Language of the World.</p> <p>(2) To help to make War Impossible.</p> <p>(3) To secure the introduction of Esperanto into the Schools.</p> | <p>(4) To encourage the production and reading of Literary, Dramatic and Scientific Works of International Importance, either by translation or in original.</p> <p>(5) To facilitate International Trade, Travel, Congresses, and Inter-course generally.</p> |
|--|--|

Because—

by doing so I shall enjoy the following **immediate advantages**:—

- | | |
|---|--|
| <p>(a) The Membership of a live Society, with definite objectives.</p> <p>(b) The right to avail myself of a selection of International Literature, translated and original, already printed in Esperanto, as well as numerous Esperanto Journals.</p> <p>(c) Taking part in the production of Esperanto plays, either as part of the audience or on the stage.</p> | <p>(d) Taking part in other Social undertakings, conducted by the Society for the benefit of Members, and the advancement of the Esperanto movement.</p> <p>(e) Undergoing, without extra charge, the course of instruction provided by the Society.</p> |
|---|--|

Eminently suitable Societies are

The Australian Esperanto Association

(Ordinary Meeting); and

La Komerca Esperanta Klubo

BOTH MEETING AT THE

Hardware Club Concert Hall

350 LITTLE COLLINS STREET,
MELBOURNE

on Friday and Monday evenings respectively

(Postal Address of both: Box 731, Elizabeth Street P.O.)

Terms: 5/- per half year, with special arrangements should you join late in the term; and

Esperanto Group "Espero," At Mont Albert

Full particulars on application to

The Secretary, Miss M. Healey, 10 Victoria Avenue, Surrey Hills, Melbourne.

Published by the Australian Esperanto Association and printed
by Peacock Bros. Pty. Ltd., 214 Queen St., Melbourne.

—Kial vi diris, ke mia patro achetis vian veston?

—Mi pensis, ke vi estas la edzo de la patrino, kaj ke via richa patro donis la monon al vi . . . la patrino sendis chekon al mi! Pardonu min; legu ĉi tiun leteron.

Shi havis leteron sur apuda tablo, kiun ŝi donis al li. Li legis:

“Tre kara Julia:

“En mia antaŭa letero mi skribis, ke sinjoro Deprat deziras edzighi kun mi. Karulino, mi jam estas sinjorino Deprat.

“Pardonu min, ke mi ne preparolis la aferon kun vi, sed mi certe edziniĝus kun li, ech se vi kontraŭstarus, tial pli bone estas fari la solenon sen via chesto.

“La bela cheko estas donaco al vi por acheti belajn vestojn. Mia nova edzo deziras, ke ĉio de ‘nia’ filino estu la plej bona en la urbo. Ĉu li ne estas kara?”

“Mi tre amas lin. Li aspektas tiel june kaj bele, ke mi timas, ke ĉiuj virinoj devas ami lin.

“Venu kiel eble plej frue al nia ĉambraro en la ‘Verda Stelo.’

“Mil kisoj!

“Via felicha patrino,

“MARIA DEPRAT.”

La letero falis el la mano de Ludoviko. Li prenis la manojn de Julia en la siajn.

—Do ni estas gefratoj.

—Gefratoj—ŝi diris.

Ili staris longe tiamaniere. Kompreneble, gefratoj ofte premas la manojn reciproke!

—Via patrino pensas, ke mia patro aspektas june kaj bele?—li ridis.

—Eble pro tiuj vortoj mi pensis, ke vi estas la duonpatro.—La bluaj okuloj brilis al li.

—Mi ofte deziris havi fratinon!

—Kaj mi—fraton! Mi pensis pri ĝi, kiam mi timis la drinkulon sur la strato hodiaŭ.

—Mi jam de nun povos helpi ĉiam, mia fratineto!

Dume, gesinjoroj Deprat revenis la ĉambraro. Ili timis, ke la infano aprobas la edzighon, ke eble filino de unu kaj la filo de la alia koleros la gepatrojn, sed kia ĝusteco estis ilia, kiam ili trovis ilin tre ankoraŭ kemaj, efektive tre gefrataj. Kompreneble, Julia ĉirkaŭprenis la novan patron, kaj Ludoviko kisis la du gefratojn.

La vespermangho estis gaja, kiam ili sidis en loghio en la teatropost la mirinda mangho, Ludoviko kaj Julia premis la manojn reciproke. Kompreneble, gefratoj ofte premas manojn reciproke!

VENECIA BARKAROLO.

Silentas Pjaceto
kaj blovas nur vent'.
Vi scias, Nineto,
pri mia amsent'?

Sub mask', sub vualo
ekkonos mi vin
tuj mem dum la balo—
kaj konos vi min—
scias mi ankau: amos mi vin!

Mi veston ŝipanan
surmetos, kaj jen
gondolon italan
mi sidos en sven'.

Alvenu, ho, kara,
en nokt' de pasi',
alvenu, alvenu, rapidu, ho kara,—
atendas vin mi. . . .
Kara! Mi kune fornaghos kun vi

Silentas Pjaceto
kaj blovas nur vent'.
Vi scias, Nineto,
pri mia amsent'!

V. N. DEVJATNIN

Cole's Book Arcade, Melbourne

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You